

Mensuel
Numéro 70
Décembre 2010

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Esperanto :
vers une culture sociale sans frontières.



SÈTE

SETO

Esperanto-Renkontigo ĉe Mediteraneo
Seto de la 22a ĝis la 26a de aprilo 2011

Vendrede 22a en Lazaret 20a 30 *FaMo* Sabate 23a kino Comedia 20a
Esperanto FILMO Dominique Gautier prezentas
sian filmon «Esperanto» premiere

Sabate 23a en teatro Georges Brassens 22a
Jacques Yvart
kantas
Georges Brassens
en Esperanto

Dimanĉe 24a en teatro Georges Brassens 21a
KAPRIO! Kapriol! frisa folkmuziko
Kaj Tiel Plu tradicia kataluna/okcitanana

Lunde 25a en Lazaret 21a
TTT:
Teatro Trupo de Tuluzo
Patric :
okcitanana kantisto
JoMo kaj Solniŝka :
slava etoso

Gustumu gastemon!
Akcepto Seta, ne estas asketa
(recepto p2)

La onta kongreso, almenaŭ gastronomi-nivele...

Ni verŝajne ĉi jare ne povos publikigi specialan numeron pri la kongreso, pro manko de aparta korespondanto en la OKK. Cxiujn informojn (alispicajn k alispicajn!) vi trovos en la retejo: <http://esperantosete2011.fr/...Bonan apetiton !>

Setece kuiru !

Setaj terpomoj

Por 4 personoj:

- 1 kg da terpomoj
- 2 ajleroj
- 3 kuleroj da olivoleo (*prefere tiun de Serge -Vidu apude ! NDLR*)
- petroselo, salo, pipro.

Majonezo:

- 2 kuleroj da vinagro
- 1 ovoflavo;
- salo, pipro; oleo (*sama konsilo ! NDLR*).

RECEPTO:

Unue ni senŝeligas kaj pecigas la terpomojn kaj la ajlerojn. Ni hakas la ajlerojn kun la petroselo. En oleita varma marmito ni antaŭkuire substas la terpomojn. Ni aldonas la hakaĵojn kaj miksas. Ni mezvarme kuiras dum 20 minutoj.

Ni aldonas salon, pipron kaj bolantan akvon ĝis la mezo de la marmito. Ni kovras kaj kuiras dum 25 minutoj.

Nun, ni preparas la majonezon sen mustardo. Poste ni verŝas kaj miksas la restaĵojn de la bolanta akvo en la majonezon.


Ni eltiras la marmiton el la fajro kaj miksas la terpomojn kun la majonezo.

Ni tuj manĝos kun ruĝa aŭ rozkolora vino.

Redaktita, adaptita, tradukita
far C.B.E.

(*Cercle Biterrois d'Espéranto*)
laŭ

«*Richesses et saveurs de l'Hérault*»
de «*Maguelonne*»
(grupo de kamparaj virinoj).



Tipe Seta terpomo...

Gusto de olivoleo

Olivarbo estas konsiderata en ĉiuj ĉirkaŭmediteraneaj civilizacioj kiel arbo de paco. Kial?

Sendube pro ĝia escepta vivdaŭro- fakte, ekzistas miljaraj olivarboj-, krome pro ĝia aparta aspekto: kun ĝia dika nodoplena trunko, ĝiaj kliniĝantaj branĉoj, arĝentaj folioj, ĝia granda adapto al kapricoj de mediteranea klimato, kiu alternigas koleremajn fulmotondrojn kaj longajn periodojn de sekeco.

Nenio estas pli agrabla ol promonado en fruktoĝardeno de olivarboj;

olivkulturistoj, kiuj laboras en tiu medio, estas rimarkindaj pro sia kvieteco, sia simplanimeco. Estas memkompreneble, ke tia arbo produktas rimarkindan frukton, olivon, kiu, premigite, donacas puran suknon kun raraj gustoj: olivoleo.

Konvenas precizigi unue, ke olivoleo estas kondimento - t.e. stimulaĵo -, kiu plialtigas la kvaliton de la manĝoj. Olivoleo ne konsumiĝas pura: ĝi estas parto de multaj pladoj, kies guston ĝi riĉigas, ĝi estas vera parto de la gustoj, kiujn oni renkontas en mediteranea manĝokutimo.

Por havigi la plej bonajn rezultojn en kuirado, konvenas koni la ĉefajn oleokategoriojn kaj iliajn diversajn karakterizaĵojn. Kutime, oni klasifikas olivoleojn en tri grandaj kategorioj: olivoleoj, kiuj posedas «verdan fruktoguston», «maturan fruktoguston» kaj «nigran fruktoguston». En ĉiu el tiuj kategorioj troviĝas diversaj intensecoj, flaraj kaj gustaj, klasifikeblaj: intensa, meza, dolĉa.

Por aprezi ĉiujn tiujn nuancojn, la gustumado de oleo obeas elprovitajn teknicojn, kies ĉefaj etapoj tiel disvolviĝas: la analizota specimeno- t.e. kelkaj mililitroj- estas metita en glason, ĝenerale koloran - la vida aspekto de oleo, tre varia, ne estas trafa indiko - kaj estas varmigita je 25-28 gradoj. Je tiu temperaturo, la volatilaj elementoj de oleo eliĝas kaj per rapidaj enspiroj, la gustumanto taksas la flarajn karakterizaĵojn de oleo.

Venas poste la gusta esploro: la gustumanto enbuŝigas etan oleokvanton,

longe maĉas ĝin, taksas la nuancojn kaj finfine glutas aŭ kraĉas ĝin.

Tiel, en la verda fruktogusto, la gustumanto trovas verdaĵ-odorojn kaj gustojn: ĵus tranĉita herbo, freŝa fojno, artiŝoko, tomatoplanto, verda banano, verda migdalo, k.t.p.

En la matura fruktogusto, troviĝas odoroj kaj gustoj ĉefe flaraj kaj fruktaj: pomo, ananaso, pruno, ruĝaj fruktoj (nigra ribo, frago aŭ frambo), tomato-frukto, avelo,...

En la nigra fruktogusto, la oleo posedas karakterizan

longan enbuŝdaŭrecon; praktike ne plu estas vegetalaj sensacoj, sed plie, gusto de nigra olivo, fungo, de subarbejo, kelkfoje kakao aŭ konfitaĵo.

Kiue estas la deveno de tiuj diversaj gustokategorioj?

Du faktoroj superas: la

arbovarioj kaj la rikoltodato.

Koncerne la francajn variojn, la verda fruktogusto devenas el tiuj olivarboj: *Aglandau, Picholine, Bouteillan...*; la matura fruktogusto el *Lucquier, Négrette...*

Koncerne la rikoltodaton, ju pli ĝi estas frua, des pli la verda fruktogusto precipas; ju pli ĝi estas malfrua, des pli la matura fruktogusto superas.

La kazo de la nigra fruktogusto estas alia: antaŭ pistomiksado, la fruktoj estas metitaj en tiaj kondiĉoj, ke fermentado efektiviĝas en la frukto mem; tiam aperas novaj gustoj kaj odoroj. Tian produktaĵon oni nomas kelkfoje «oleo laŭ malnova metodo».

La kuiristo aŭ kuiristino devas bone posedi konon pri oleo, kiun li aŭ ŝi aĉetas, utiligas en sia kuirarto. Harmoninocio inter la ingrediencoj kaj la oleo gravas, do povas esti, ke li aŭ ŝi aspiras bonegajn rezultojn por regali parencojn, amikojn.

Tiel, li aŭ ŝi partoprenas iomete, je sia eta skalo, en la pravigo, ke olivarbo estas arbo de paco.

Serge Eysseric, oleo-faristo

Perkoresponda instruado

De du jaroj, mi partatempe okupiĝas pri la perkorespondaj kursoj de nia asocio. Tio signifas, ke mi ricevas la aliĝojn de lernantoj por iu kurso kaj provizas ilin per iu gvidanto-korektanto. Poste, la rilato okazas inter la korektanto kaj la lernanto. Okaze de aliĝo, mi ankaŭ rilatas al la libroservo kaj kasisto. Foje, la vojoj inversiĝas sed atingas la saman celon. La laboro ne estas tre peza, iom pli estus pli kontentiga. Mi ankaŭ plezure rolas, kiel korektanto.

La lernantoj laboras per iu el la proponataj libroj, sendas siajn ekzercojn al la korektanto, ĉu poŝte, ĉu rete. Amika rilato plejofte estiĝas inter la du personoj. La korektanto korektas sed ankaŭ gvidas, konsilas, instruas.

Mi decidis ĉesigi mian disdonan laboreton kaj prezentis mian demision al la Komitato pro persona kialo, t.e. ĝenerala laceco, proaĝa pigremo. Kelkaj malnovaj malfacilaĵoj emas ampleksiĝi.

Ni ĉiuj scias, ke instruado estas grava agado, precipe por asocio tia, kia la nia. Mi esperas, ke en la proksima estonteco, favore de mia foriro, iu kompetenta persono pripensos ian novan manieron plenumi distancan instruadon. Oni ne instruas distance, kiel en klasoĉambro.

Ni devas konsideri plurajn demandojn:

- Ĉu niaj metodoj kongruas por agrabla kaj bonkvalita studado? Ĉu la elektitaj lernolibroj taŭgas? Ĉu entute, lernolibroj taŭgas?

- Ĉu ni ne devas ekzameni, eble modifi, adapti la nunajn studlibrojn?

- Ĉu ni devas interesiĝi pri metodoj specife retaj por trafi pli junajn aliĝantojn? Tamen, ankoraŭ nun, kelkaj valoraj lernantoj preferas la plumon al la klavaro.

- Ĉu, se uzi Interretan, ni devas plani, disvolvi, starigi apartan sektion en nia asocia retejo dediĉitan al instruado?

- Ĉu ne estus pli efike, klare apogi, eble finance, teknike kaj homforte ekzistantan instru-retejon, kun kapablo jam larĝe agnoskita?

Niaj korektantoj donas sian tempon por helpi personojn, kiuj klopodas kontentige lerni nian lingvon. Ili ŝatas tiun laboron. Mi ŝatas tiun laboron. Mi komencis mian gvid-oficon, antaŭ ol komenci la ĝeneralan prizorgadon, en 2004. Tiam, neniuj demandoj min pri mia kapablo. Verŝajne, iuj bonaj amikoj favore taksis min.

Certe iu plurfaka kompetentulo sin kaŝas inter niaj membroj, kiu kapablos evoluigi la kursoagadon kaj starigi novajn metodojn pli allogajn kaj varbe efikajn.

Claude Gerlat

La problemo starigita de Klaŭdo, kaj pere de ties (komprenebla) demisiio, kaj pere de ties fina demandforma sintezo ne estas triviala. Ja SAT-Amikaro havas kiel celon proponi kursojn, sed statuto per si mem ne kapablas provizi al asocio kompetentulon, kiu plie estu aktivega aktivulo. Ne temas pri sindonemo: sindonemuloj estas certe tre simpatiaj homoj, sed neniuj efikas pli ol volontulo kiu agas unue pro sia propra plezuro. Ne brakoplekte atendente tiun «raran birdon» la interesatoj⁽¹⁾ decidis starigi seminarion kiel eble plej frue, en loko decidota (eble Greziljono).

Unu el la problemoj pridiskutotaj estos, kursoj jes, sed kiucele? Ĉu nepre ni devas prepari la lernantojn al ekzamenoj, kaj se jes, al kiuj?

Ne banala demando, kiam aperas forta propagando favore al submetiĝo al «internacia Eŭropa kadro» kiu aspektas pli strategia (oni agnosku Esperanton) ol pedagogia, kaj ankaŭ iom «komerca» - vidu la tarifojn en la kongreso de Seto: 72 kaj 82 € nur por trapasi ekzamenon, tio starigas evidentan selektadon per mono.

Bonvenaj estas la reagoj, komentoj, proponoj rilate tiujn gravajn problemojn.

Serĝo Sir'

⁽¹⁾ Ĝis nun enskribiĝis al la seminario Claude Gerlat, Vito Markovo, Marie-Hélène Desert kaj mi mem, sed se troviĝas aliaj interesatoj, tiuj sin anoncu kiel eble plej rapide. (Eblas telefoni 0450 777 118)

Reago al la aliĝo de SAT-Amikaro al APRIL

SAT-Amikaro dans son dernier numéro de la SAGO (novembre 2010), annonce son adhésion à l'APRIL - www.april.org - Association pour la Promotion et la Recherche en Informatique Libre.

L'espéranto et les logiciels libres partagent certaines valeurs communes.

En particulier, l'espéranto comme les

logiciels libres, sont des biens communs, non discriminatoires, librement utilisables par tous, sans être la propriété de personne.

Le soutien d'une importante association espérantophone à l'APRIL, ne peut que contribuer à faire favorablement connaître l'espéranto dans une communauté, celle du logiciel libre, active, en croissance, et surtout qui joue un rôle moteur dans l'innovation en informatique.

Bravo à SAT-Amikaro pour son initiative !

DJ

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo Seta kongreso ĉe la horizonto
 - 2 La Seta kongreso, gastronomi-nivele
 - 3 Perkoresponda instruado
 - 4 Selle Humuraĵoj
 - 4-5 La desupra ekologio kaj la demalsupra... (2a parto)
 - 5 Pri «La Bellevilloise»
 - 6 Deportado de Hindoĉinoj
- Supplément en français**
- 7 Salutations de IMT à SAT
 - 8-10 Dans la presse, et ailleurs...
 - 10 Les mille bouts de la langue
- 11 Praktikaj informoj
 - 11.12 Kiel traduki : Propre
 - 12.13 Libro-servo Recenzo
Libroj vivas pli longe
 - 14 Legindaj Legendoj
 - 14.15 Esperantistoj aktivas Reklamo (jes !)
 - 16 Esperantistoj aktivas Ĉe la lago 70

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Elizabet'	Barbay
Albert	Cnudde
Serge	Eysseric
Claude	Gerlat
Louis	Gohin
Françoise	Guillaumé
Bruno	Henry
	Klod
Ĵak	Le Puil
Michel	Marko
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Yves	Nicolas
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant
Cerde Biterrois	d'espéranto

Selle humuraĵoj



Elekto en tempo de financa krizo.

Kial vi murdis vian bopatrinojn ?

Baldaŭ estos ŝia naskiĝtago, kaj mi ne havas sufiĉe da mono, por fari donacon al ŝi !



La nova vino alvenis !

Vi longatempe reparolos pri tiu delikata gusto de benzeno !

...kaj tiu aromo de eluzita motoroleo !



Novaĵo pri pariza muzeo.

Vi estas antaŭ nova versio de la fama pentraĵo prezentanta la florencan sinjorinon nomitan Giokondo.

Vi imagu ŝian enigman rideton sub la nikabo.



Du konceptoj pri ekologio - dua parto La desupra ekologio La demalsupra ekologio

La daŭrigebla disvolvo ne rilatas al pensado pri la tekniko kaj ĝiaj konsekvencoj, sed estas sekvota vojo, por apliki teknikajn rimedojn al la malbonoj estigitaj de la tekniko. Ĝi baziĝas sur la ideo, ke kvazaŭ kompleta kaj racia sciado pri la naturo estas ebla, kaj ke konsekvence teknologia solvado de la vivmediaj demandoj estas ankaŭ ebla. La daŭrigebla disvolvo ne inkluzivas ligitcon inter detruo de la naturo kaj disvolviĝo de la tekniko mem. Tamen laŭ «principo de singardeco» oni devas rezigni iujn teknikojn, se ili montriĝas danĝeraj. En la Brundtlanda raporto troviĝas rezervoj pri disvolviĝo de la atomenergio, ĉar ĉi tiu lasta okazigas altajn elspezojn kaj danĝerecon, sed samtempe estas reliefigata la supozo, ke ĝi ne emisias gasojn kun forceja fenomeno, kio helpas en lukto kontraŭ la klimata plivarmiĝo de la terglobo. Same en la protokolo de la konferenco okazinta en Rio-de-Ĵanejro (en la jaro 1992), la demando pri la atomenergio estas traktita laŭ la vidpunkto de kiel eble plej efika zorgado pri la radioaktivaj forĵetaĵoj, sen kontesti la estigon de ĉi tiuj lastaj. En ĝenerala maniero, laŭ la desupra ekologio, prefero por la atomenergio estas rigardata kiel teknika elekto ofte prezentata sub la formo de neceseco, ĉar granda fido estas metita sur disvolviĝon de la scienco kaj tekniko, kiujn oni supozas certigi la regadon super tiu energio kaj ebligi solvon de la demando pri la radioaktivaj forĵetaĵoj.

La daŭrigebla disvolvo implicas la koncepton pri partopreniva demokratio (francalingve *démocratie participative*) kontraŭe al reprezentiva demokratio (francalingve *démocratie représentative*). Laŭ la 10-a principo de la deklaro farita en Rio-de-Ĵanejro (en la jaro 1992), la partopreno konsistas en eblo donata al la koncernaj civitanoj preni informojn pri la vivmedio. Laŭ la OEKD, la entreprenoj, laboristoj, konsumantoj kaj neregistaraj organizaĵoj devus havi la eblon partopreni en la debatoj pri la manieroj produkti kaj konsumi; la publiko devus havi la eblon esprimiĝi per efikaj rimedoj, ekzemple per juĝaj proceduroj. Tute ne temas pri organizado de debatoj pri la taŭgeco de la prezentataj projektoj, sed pri la volo komprenigi kaj akceptigi ilin, ĉar ili estas «necesaj». La partopreno do estus regorimedo, kiu ebligas eviti

barojn aŭ tro multajn oponojn pere de almikso de deziroj kaj petoj de koncernataj civitanoj. La decidopovo restas ekster la sfero de la partopreno.

La Agendo por la 21-a jarcento (tiel nomata *Agenda 21*) estas la UN-a programo por la terglobo. Ĝi aliformiĝas en teritoriajn programojn (francalingve *Agendas 21 locales*) en la skalo de regionoj, municipoj aŭ kvartaloj. Sekve de ĉarto subskribita en Alborgo (Danio) en la jaro 1994, multaj eŭropaj magistratoj partoprenas en tiuj programoj kaj enmetas en ilin partoprenivajn procedurojn interalie pri lokaj aranĝoj por la daŭrigebla disvolvo.

La karakterizaĵoj de la daŭrigebla disvolvo nature kondukas al forta inklino por ŝtata aparato, ties funkcia maniero kaj kapablo eventuale trudi. Tio venas de la fakto, ke la koncepto pri la daŭrigebla disvolvo naskiĝis en la interregistaraj sferoj de Un-o kaj inter ties fakuloj. Ekzemple, la lasta ĉapitro de la Brundtlanda raporto estas dediĉita al demandoj pri reformoj farotaj en la ŝtatoj, por apliki la daŭrigeblan disvolvon.

Tiel la daŭrigebla disvolvo estas konceptita, por esti teknika rimedo en la servo de la ŝtatoj. La subtenantoj de la daŭrigebla disvolvo ŝajnas esti fascinitaj de indikaĵoj kaj procedas per dividado de la realaĵo. Ĉiu malgranda kampo de la homaj aktivecoj estas difinita kaj poste reduktita al cifera indikaĵo, kies pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo liveras supozon pri la iro de aparta socio al la daŭrigeblo. Tiu volo ĉion kontroli devige kondukas al miksaĵoj; ekzemple en Svisio, en la jaro 2005 indikaĵoj estis jenaj: «konsumado de tabako», «memmortigokvanto», «regula uzo de nacia lingvo», «probabla lernotempo de la fremda loĝantaro», «konsumado de produktaĵoj el la justeca komerco», «procento de rekuperado de la forĵetaĵoj» ktp. Oni supozas, ke tiaj indikaĵoj ebligas al ŝtato alie direkti sian agadon al la daŭrigebla disvolvo. Aparte miriga estas la indikaĵo «la buĝeta ekvilibro»: ĝi montras, ke publika kolektivo, kiu ne sukcesas ekvilibrigi siajn kontojn, ne estus daŭrigebla, sen fari distingon inter konsumado kaj investado; tio signifas, ke municipo, kiu devus ŝuldiĝi, por ebligi konstruon de socialaj loĝejoj laŭ altnivela vivmedia normo, agus malpli daŭrigeble ol alia, kiu malmultekoste

konstruigus loĝejojn konsumantajn multe da energio. Tiu ekzemplo atestas, ke la daŭrigebla disvolvo povas esti utiligata profite por la novliberala konformismo.

La politikoj pri la daŭrigebla disvolvo ne malakceptas la ekonomian strukturon de la kapitalisma socio, sed nur klopodas, por igi ĝin esti daŭrigebla. Laŭ la OEKD, la rimedoj, kiuj baziĝas sur la leĝoj de la merkato, estas pli efikaj ol reglamentado, por atingi vivmediajn celojn; ili konstante instigas al teknikaj ennovaĵoj. La tiel nomata «industria ekologio» estas tipo de apliko de tiu pensmaniero al la ekonomia sistemo. Temas pri «ringigo» de industriaj sistemoj, por plej multe redukti la materialajn kaj energiajn perdojn dum produktado. Ekzemplo troviĝas en la tiel nomata «Kalundborga industria unueco» (franclingve *symbiose industrielle de Kalundborg*) en Danio, kie reto da industrioj funkcias, tiel ke forĵetaĵoj de fabriko fariĝas krudaj materialoj por alia. La industria ekologio ne havas la celon redukti la tutan produktadon, sed subteni kaj eĉ kreskigi ĝin, malgrandigante la premon sur la vivmedion.

La plej konservativaj el la subtenantoj de la daŭrigebla disvolvo akcentas la eblon anstataŭigi nerenovigeblajn resursojn per artefaritaj kaj la eblon konservi la nunajn manierojn de produktado, zorgante pri la vivmedio interalie per rimedoj de la merkato (pridiskuteblaj permesoj polui, ekotaksoj...). La plej reformemaj el la subtenantoj de la daŭrigebla disvolvo insistas, ke oni ne konfuzu disvolvon kun ekonomia kreskado. Ili estas favoraj al reglamentado kaj al efektiva tutmonda regpovo, por konkretigi la koncernan celon.

Fakte, la daŭrigebla disvolvo estas ekologia ŝanĝo en daŭrado.

Ĉirkaŭ la 1970-aj jaroj, la kontraŭeeco en la kapitalisma disvolvo, la demiurga industriigo, la detruo de la terĝlobo kaj de loĝantaroj kondukis al disvolviĝo de multaj kontraŭstaroj. Paralele kun tiuj kontraŭstaroj, estiĝis pensoj kaj teorioj pri oponado al la socio de senlima ekonomia kreskado komuna al la kapitalismo kaj al la tiama soveta birokratismo. Temis pri konkero de memstareco per penado, por forigi la socian instigon krei artefaritajn bezonojn. La politika ekologio fariĝis maniero denove formuli la projekton de homa emancipiĝo. Ĉar la politika ekologio postulis plenan transformadon de la manieroj produkti kaj vivi, ĝi estis nekonfuzebila kun la nura volo protekti la vivmedion.

Post majo 1968, la temoj de pli bona vivmaniero, de memstareco, de memmastrumado, de individua libereco multiĝis. Tiam aperis la tiel nomita «dua maldekstrularo», reprezentata de la Unuigita Socialista Partio (franclingve

Parti Socialiste Unifié - PSU), kiu estigis gravan parton de la aktivuloj de la politika ekologio. En la jaro 1974, la agronomo *René Dumont* estis la unua ekologiista kandidato al la franca prezidenteco; liaj tezoj estis forte trapenetritaj de la memmastrumada socialismo. La plimulto de la eŭropaj verdaj partioj fontas el kunfandiĝo de du tendencoj: la tendenco favora al protektado de la vivmedio kaj la radikala tendenco malfavora al la socio de konsumado; tio povas esti la kialo de oftaj diskutoj pri la desupra ekologio kaj la demalsupra en la sino de tiuj partioj. Ĝenerale la subtenantoj de la daŭrigebla disvolvo preferas uzi la dirmanieron «eltenebla disvolvo», por eviti konfuziĝon kun la komunaj konceptoj, kiuj ĉefe montras la daŭrigeblan disvolvon sub la formo de daŭrigebla ekonomia kreskado.

La subtenantoj de la demalsupra ekologio, ankaŭ nomata ekologiismo, timas, ke la ekologia demando estigu 2 solvojn, kiuj fariĝus kontraŭaj al ilia celo: - la aperon de ekologia teknokrata diktatoreco, - la akaparon de la ekologio fare de la kapitalismo.

Laŭ la demalsupra ekologio, en la lukto por la vivmedio, tio estas por ia kvalito de la maniero vivi, la naturo ne devas esti konsiderata por si mem. La ekologiisma demando baziĝas sur la dezirindaj rilatoj inter la homo kaj la naturo unuflanke, kaj inter la homo kaj la socio aliflanke. Laŭ tiu vidpunkto, estus iluzio okupiĝi pri vivmedio, sen kompreni la kialon de ĝia difektiĝo. La nuntempa vivmedia krizo rezultas el la ideologio de la ekonomia kreskado, kapitalisma aŭ burokratisma. La ekologiistoj opinias, ke estus stulte kaj eĉ danĝere, se oni ĝojus pro interesiĝo de la politikaj institucioj aŭ de la kapitalistoj pri la ekologia demando, ĉar en tiu okazo la kapitalismo zorgus pri la vivmedio, nur por daŭrigi sian ekzistadon aŭ malkovri novajn fontojn de profito (ekzemple la malpoluadon). La verda politikisto *Daniel Cohn-Bendit* rimarkigis la jenon: «Kiam oni legas el la kapitalismaj pensistoj, tiam oni vidas, ke ankaŭ ili bone komprenis, kaj ili ne estas malsaĝaj, ili tre bone scias pri la estanta demando pri materialaj limoj. Sed tio nenion solvas per si mem. Tio montras, ke kompreno pri limiĝo de la resursoj neniel difinas politikon; el ĝi oni povas konkludi al tute kontraŭaj principoj».

Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *Les deux âmes de l'écologie - Une critique du développement durable*, verkita de la geografo kaj politikologo *Romain Felli*, eldonita de la firmao *L'Harmattan* (5-7 rue de l'École polytechnique, 75005 Paris) en la jaro 2009.

Kiam laboristoj povis lerni Esperanton ĉe sia laborloko

aŭ

Historia paĝo pri kooperado kaj franca laborista movado

«*La Bellevilloise*»; entrepreno fondita tuj post la Pariza Komunumo ĉe la altaĵoj de *Belleville* kaj *Ménilmontant*, estis unu el la societoj plej tipaj kaj famkonataj pri la franca kooperativa movado.

Krom sia negoco pri varoj kutime konsumataj, «*La Bellevilloise*» grade plivastigis diversajn servojn ne profesiajn, esence socialajn, edukajn, kulturajn. Infanoj povis partopreni en ĝia infanvartejo kaj ĝui restadojn ĉe ferikampoj. Vidvinoj kaj strikantoj profitis bezonatan subtenon por fronti tujajn malfacilaĵojn. Ankaŭ eblis lerni Esperanton aŭ tajpadon, same sportumi aŭ ĉeesti koncertojn de famegaj interpretistoj, prunti librojn de biblioteko, aŭ danci okaze de multaj festoj, partopreni filmprojekciojn, kiel «*Kirasŝipo Potemkin*», kvankam malpermesita pro cenzuro, aŭ ĉeesti prelegon pri tuberkulozo aŭ pri Marok-milito, konsulti kuraciston aŭ flegi sian dentaron. Fruege agante kun la komunista partio, «*La Bellevilloise*» ĉefe efikis, kiel ilo pri laborista solidareco kaj politika socialagado. La tumulta historio naskas ankoraŭ nunajn pridemandojn, aparte : ĉu prisocialaj ekonomioj apartenas al utopio? - ĉu eblas organizi konsum-kooperativon ligitan kun laborista organizo?

Albert Cnudde

Fonto : « Lettre du Comité d'histoire des administrations chargées du travail, de l'emploi et de la formation professionnelle », 2010.

NDLR: Artikoloj pri «*La Bellevilloise*» jam aperis en la franca suplemento de *La Sago* 47, kaj en la n° 59 okaze de Z-festo.

El la rizejoj al Kamargo kaj la deportado de Hinduĉinoj

Tekstoj el S-ino Liêm Khê Luguern kaj el «*Carnets du ViêtNam*» n-roj 23 kaj 24.

Du tekstoj tre interesaj, kaj precipe la historia tezo verkita far Liêm Khê, pri multaj informoj koncerne la periodon de la franca koloniismo. Estas logike, ke ŝi parolas al ni pri tiu lando, ĉar ŝi devenas el tiu mirinda lando. Ne forgesu ke la vjetnama popolo, dum pluraj jaroj, batalis por sia sendependeco. Oferado de sango estis grava.

Dum la unua mondmilito (1914-1918), perforte la kolonia ordonpovo venigis el Vjetnamio (por laŭdire la patrolando) laboristojn nespecialigitajn (en franca lingvo *ONS = ouvriers non spécialisés*) kiuj tiel iĝis kvazaŭ sklavoj de la militomaŝino.

Certe, en sia libro, la historiisto **Pierre Brocheux** konfirmis ke tiuj laboristoj akiris faro-scion. La koloniistoj perforte rekviziciis, en la kamparo kaj rizejoj, junulojn por labori en minejoj de nikelo, en Nov-Kaledonio kaj Nov-Hebriidoj.

En 1939, la ministro pri kolonioj, **Georges Mandel**, apogante sin sur la spertoj de la unua mondmilito, redonis vivon al servo de la indiĝena laboristaro, ĉu en Afriko, ĉu en aliaj kolonioj (M.O.I.= *Main d'oeuvre indigène*), dependanta de ofico pri laboro.

La decido de la 29a de aŭgusto 1939 starigas rekvizici-rajton, en Hinduĉinio. 90% el la 20 000 laboristoj necesaj, tiam perforte estis varbitaj en la amaso de la malriĉaj kamparanaroj (tiam, en Anamo, Tonkino, kaj en la protektoratoj). La aliaj rekviziciitoj devenis el Koĉinĉinio.

En sia teksto, Liêm Khê elvokis la enkadriĝon. Ĉar en Hinduĉinio la francoj estis malplimultaj, ili sin turnis al volontuloj posedantaj nivelon de elementa instruado.

Dum periodo, koncerne Hinduĉinojn ili ne metis tiujn en la sama nivelo kiel francojn, eĉ analfabetaj. Mi povas mencii tion kio okazis pri vjetnamano, en publika servo, kiam franco sin lokis antaŭ li kaj tamen, temis pri vjetnama advokato kiu formulis rimarkon «Pardonu sinjoro, vi estas prenanta mian lokon, en la vico». De la franco, jen la repliko : «Ĉu vi volas vangofrapon?».

Do la perfektaj parolantoj de la franca lingvo iĝis interpretistoj. Tiamaniere, ili pensis trovi la okazon por eskapi el kolonia socio, pro blokado, kiu rifuzis al ili plej malgrandan promocion.

La 20an de oktobro 1939, la ŝipo «Yang Tse» envojis 19 000 analfabetajn kamparanojn, al Francio. Necesas diri ke tiu deportado estis treege kruela, ĉar ili estis elradikigitaj el siaj rizejoj, kaj hejmo, kie troviĝas la altaro ebliganta vidi la vizaĝon de la gepatroj, senigitaj je kutima omaĝo,

ĉiuvespere, per incensobastoneto. Tiel, pri tiu deportado, la koloniismo senmaske montriĝis.

Post unu monato, la 21an de novembro, la unuaj laboristoj elŝipiĝis en Marsejlon.

Surloke, ili estis amaslokitaj, kiel ŝafoj, en konstruoj apenaŭ finitaj.

En sia verko, Liêm Khê prave elvokas la uzon de tiuj kamparanoj kiel «laboristojn - soldatojn», administritaj de la «M.O.I.», submetitaj al severa militista disciplino.

Tiel, tiuj homoj estis dispartigitaj en 73 kompanioj de 200 ĝis 300 laboristoj.

La supera komando konsistis el militistoj kaj ŝtatoficistoj de la kolonia administrado. Publikaj servoj kaj privataj firmaoj konsentintaj la kondiĉojn de la klaŭzaro, povis uzi ilin. Ne necesas diri, ke tiuj homoj estis malmulte pagataj.

En junio 1940, la «ONS» ĉefe laboris pro la industrioj de la nacia defendo, en 24 departementoj, el kiuj pulvofabro en *Saint Médard* (2 327 ONS), estis postulita la kolektiva produkt-kvanto.

La kompanioj retretis en liberan zonan, laŭ la armistico-klaŭzoj. La registaro kiu kapitulacis, troviĝis, laŭdire, en libera zono. Do, ĉiuj «ONS» estis surloke. Ili estis uzitaj en arbaristaj laboroj, ĉu en Kamargo, por la rizokulturo, ĉu en Avejronio.



1942- Post usona albordiĝo en NordAfrikon, la naziaj armeoj invadis la liberan zonan. Do, 43% el la hinduĉinaj laboristoj devis labori por la germanaj okupacitaĉmentoj.

Liêm Khê, pri tiuj malfeliĉuloj, rimarkigis la treegan suferadon: 1061 forpasintoj pro pulma tuberkulozo... kaj ankaŭ la perfortaĵojn de la soldataro.

En sia artikolo, **Alain Guillemin** precizigas

ke la rizo, en Kamargo, datumis de la 15a jarcento; dank' al araboj el Sicilio. La Vjetnamoj servis en la deviga laboro.

Liêm Khê asertas ke «al fizika suferado aldoniĝis morala suferado». La kontaktoj estis ofte malbonaj kun la civila loĝantaro, sed, kelkfoje, ekzistis geedziĝoj kun lokaj virinoj.

Ili ne estis helpitaj pro koloniaj kadroj kies rasistaj antaŭjuĝoj estis persistemaj, kaj malbone traktitaj de la polico de **Vichy**.

Ni povas scii ke multaj «ONS» kuniĝis al la rezistancon. Pri tio, inter la ostaĝoj de Ŝatobriando, mortpafitaj, estis vjetnama instruisto.

Dum la liberigo, la plimulto el tiuj homoj, tamen, sopiris al prompta repatriigo, kiu malfruis pro malorganizo de la postmilito, kaj eventoj en Hinduĉinio. Pro **Vjet Minh** movado, surloke, la rekviziciitoj postulis sian emancipadon, egalrajtecon kun metropolaj laboristoj.

25 000 Hinduĉinoj, post kongreso en Avinjono, strukturis «Ĝeneralan delegacion», kaj multaj estis favoraj al sendependeco de Vjetnamio: strikoj, malobeomovoj, manifestacioj, ktp.

En 1948, la ministro pri kolonioj arestigis kelkajn agitantojn, en «*Blas*» (Lot-Garonio), poste, perforte, ili estis enŝipigitaj al Hinduĉinio. Iuj el tiuj homoj, post alveno, estis enkarcerigitaj, aŭ reatingis la «*Vjêt Minh*». La raraj postvivantoj vivis, en 2006, en senhaveco, sen agnosko nome de Francio, kiu tamen, deportis ilin. La milo da rekviziciitoj postrestintaj en Fancio, siaflanke, sociale strukturas kunecon, unuforman. Ofte, temis pri voktoj aŭ interpretistoj.

Persone, mi konsideras min, sentimentale, ligita al Vjetnamio kies kulturo ekzistis longtempe antaŭ la milita kaj politika invado de francoj. En tiu lando, estis civilizacio. Mia opinio, Vjetnamio povis plenumi, samtempe, sian intelektan kaj ekonomian kreskojn.

Kredi je pozitiva organizo far Francio estas mensogo kiun bedaŭrinde ankoraŭ oni trovas en la libroj de la Nacia edukado⁽¹⁾.

Konklude, iuj komentoj, pri franca koloniismo estis verkitaj far mi. Sinjorino Liêm Khê prezentis sian tezon pri precipe la deportado de kamparanoj en Francion.

Louis Gohin.

NB: «*Viêt Minh*» komunista liberiga movado

⁽¹⁾ *La Nacia Edukado ne eldonas librojn. Oni komprenu, ke la Nacia Edukado ne malpermesas librojn kiuj prezentas tiel la aferon. NDLR.*

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières



Salutations de la Tendance Marxiste Internationale au congrès de l'association mondiale des travailleurs espérantistes SAT

Au nom de la Tendance Marxiste Internationale, j'envoie des salutations au congrès mondial des travailleurs espérantistes qui se tient à Braşov, Roumanie, en août.

D'après une légende biblique, une immense tour fut construite dans l'ancienne Babylone, et sa chute conduisit à la diversité linguistique, par laquelle les hommes furent punis de leur arrogance et obligés de communiquer à l'aide de langues différentes, qui ne leur permettaient pas de se comprendre.

Il n'est pas nécessaire de croire à ce mythe pour comprendre quelles sont les barrières immenses qui se dressent sur le chemin de la compréhension mutuelle entre les hommes.

Au Moyen-Age, avant la naissance des Etats-nations modernes, la vie culturelle et économique des nations était limitée par différentes barrières telles que les taxes et impôts locaux. Le rôle progressiste du capitalisme a été de détruire ces barrières archaïques pour inaugurer l'époque de l'Etat-nation moderne.

Mais maintenant, dans la première décennie du 21ème siècle, l'Etat-nation lui-même est devenu un obstacle au développement du progrès humain. Le développement des forces productives et du marché mondial sous le capitalisme a depuis longtemps dépassé les limites de l'Etat-nation et de la propriété privée.

La crise actuelle est, fondamentalement, l'expression de la rébellion des forces productives contre le corset étouffant qui empêche le développement de la civilisation et de la culture humaines.

L'avenir de l'humanité, et même la survie de la vie sur la planète Terre, exige une rupture drastique avec le passé. Une économie planifiée rationnellement sous le contrôle démocratique de la classe ouvrière est la seule alternative au chaos destructeur du marché.

Mais le socialisme est internationaliste par essence. Notre internationalisme

n'est pas dû à des considérations sentimentales. Il reflète une nécessité absolue. Le monde s'est déjà unifié en une entité économique indivisible: le marché mondial.

Cependant, sous le capitalisme, la mondialisation ne signifie pas l'abolition des contradictions nationales mais, au contraire, le renforcement de ces contradictions jusqu'à un niveau jamais atteint auparavant, avec un chômage de masse, du protectionnisme, des guerres, du terrorisme, du racisme et toutes les horreurs que nous pouvons voir de toutes parts.

Pour résoudre ces contradictions, il faut une économie mondiale fondée sur une planification rationnelle mettant en place des relations équilibrées entre ses différentes composantes. On ne peut atteindre cela que par l'abolition du capitalisme et la mise en place d'une fédération socialiste mondiale.

Le Mouvement Espérantiste, depuis ses origines, est intimement lié au socialisme et à la bataille de la classe ouvrière mondiale pour son émancipation vis-à-vis de l'esclavage capitaliste. Ce n'est que lorsque les hommes établiront des relations vraiment libres et égalitaires que l'ont pourra passer du saut de l'humanité depuis le règne de la nécessité jusqu'au règne de la liberté.

Dans un monde socialiste, les frontières, les passeports et les barrières douanières seront envoyés dans les poubelles de l'histoire avec tous les déchets nationalistes et racistes. Ils seront vus par les générations futures de la même façon que nous regardons actuellement les anciennes barrières féodales, que les révolutions bourgeoises ont balayées par le passé.

Lors de cette nouvelle aube de l'humanité, l'idée d'une langue internationale apparaîtra tout naturellement. De même que dans l'Europe moyenâgeuse tous les gens instruits savaient lire et écrire le latin, dans le monde socialiste à venir, les hommes communiqueront librement à l'aide d'une langue mondiale.

Il est peut-être trop tôt pour prévoir de quelle langue il s'agira. En général, l'évolution des langues est un processus compliqué qui résiste à toutes les tentatives de planification rationnelle. Nous pouvons supposer, que les hommes feront leur choix tout à fait librement, sur la base des expériences collectives. Le choix final pourrait bien être l'Espéranto, mais il pourrait aussi être une modification de l'une des langues mondiales actuellement existantes (Anglais, Espagnol, Chinois). Il est trop tôt pour le dire.

Mais quelle que soit la direction que prendra l'humanité future, le rôle pionnier du mouvement espérantiste, et sa contribution importante à la bataille pour la démocratie, le socialisme et l'internationalisme, sont déjà évidents aux yeux de tous.

Le simple fait, que des hommes de différentes parties du monde se sont réunis pour discuter des problèmes que rencontre la classe ouvrière mondiale à l'aide d'une langue commune est une preuve suffisante de la vigueur actuelle du mouvement espérantiste.

Nous vous souhaitons un travail efficace, et attendons le jour où l'humanité pourra enfin mettre de côté le mythe de la tour de Babel et trouver une langue commune, qui sera une contribution vitale à la construction d'un monde adapté à des hommes libres.

Alan Woods, le 21 juillet 2010

Traduit de l'anglais par Vinko Markov

Traduction en espéranto sur:

<http://satesperanto.org/Salutoj-de-la-Internacia-Markisma.html>

La Tendance Marxiste Internationale est une organisation qui a pour but de diffuser les idées du marxisme à l'ensemble du mouvement mondial des travailleurs. Elle a une influence surtout au Venezuela et au Pakistan. Son site dispose d'une rubrique en espéranto:

<http://www.marxist.com/esperanto/>

"Et pourquoi pas l'espéranto?"

■ Le *Courrier des lecteurs* du *Courrier de l'Ouest* (Angers) 19/09/2010 publie une réponse à une lettre de M. Tremblay intitulée «Il faut parler plusieurs langues», parue dans Le Courrier de l'Ouest du 6 septembre:

"M. Tremblay écrit que les plus mauvais élèves en langues étrangères sont "de loin" les Anglais. Il faudrait ajouter que les jeunes Anglais apprennent de moins en moins le français et les autres langues. Comment pourrait-il en être autrement? C'est la conséquence directe de la domination de leur langue qui s'appuie jusqu'à aujourd'hui sur la suprématie économique, politique et militaire des États-Unis.

"Cette manie d'angliciser" ⁽¹⁾

Ainsi, tandis que les jeunes des autres pays doivent consacrer des milliers d'heures pour espérer acquérir la maîtrise de l'anglais, les jeunes des pays anglo-saxons peuvent utiliser ce temps disponible pour faire progresser leurs connaissances dans les domaines techniques ou scientifiques. Il est évident que cette situation privilégiée, renforcée par la manie d'angliciser à tout va comme le vocabulaire courant ou la publicité, menace les positions de la langue française (dans un livre récent, le linguiste Claude Hagège a écrit: "Le premier péril vient de l'anglais"). Et, en Afrique, par exemple, le Rwanda vient de détrôner radicalement le français pour le remplacer par l'anglais.

Que dire aussi de l'actuelle désaffection en France pour l'étude de l'allemand, pourtant langue d'un pays frontalier et grand partenaire commercial? Mais la roue de l'Histoire ne cesse de tourner, qui aurait imaginé – il y a quelques décennies – l'implantation à Angers d'un Institut Confucius diffusant langue et culture chinoises?

En ce qui concerne l'amélioration éventuelle des conditions d'étude des langues dans nos lycées et collèges, il est certain que les suppressions de postes d'enseignants ne favorisent pas un progrès substantiel.

Puisque finalement il s'agit de multiplier les contacts effectifs entre les citoyens des différents pays, on peut se demander pourquoi les autorités responsables de l'Éducation nationale refuseraient de prendre l'initiative d'expériences scolaires portant sur l'initiation à la langue internationale espéranto et sur son utilisation pour des échanges scolaires.

De telles expériences faites à l'étranger ont, non seulement été réussies, mais ont aussi démontré que l'étude préalable de l'espéranto favorisait l'étude ultérieure des langues étrangères.

"Respect des cultures"

Depuis maintenant 123 ans, des millions d'espérantophones de cinq générations ont fait la démonstration de l'efficacité de l'espéranto avec aussi des milliers de congrès, rencontres, forums ou festivals, tandis que la littérature ne cessait de se développer. Toutes ces réalisations étant menées à bien par des bénévoles, en dépit des périodes d'interdiction et de persécutions dans certains pays.

Voilà un bel exemple de parfaite communication, en tous domaines, d'homme à homme, avec une économie considérable de temps, d'énergie, de travail et d'argent, au moyen d'une langue de synthèse⁽²⁾ spécialement conçue, neutre et équitable pour tous les peuples dans le respect de leurs cultures."

Pierre JAGUENEAU, Centre culturel angevin d'espéranto

⁽¹⁾ Les intertitres sont de la rédaction

⁽²⁾ Plus exactement: «conventionnelle» (NDLR)

■ *Le Bien Public* du 16/10/2010 publie ceci:

QUETIGNY

La Ville diplômée



J.-M. Pierret, président de Léo, a remis le diplôme 2 étoiles espéranto à P. Schmitt, conseiller municipal. Photo B. C.

Depuis 2003, l'espéranto fait partie du panel des activités proposées par le centre social et culturel Léo-Lagrange. Le président de cette structure, Jean-Michel Pierret, a remis le diplôme des 2 étoiles espéranto à la Ville, représentée par Philippe Schmitt, conseiller municipal délégué à l'Environnement. L'attribution du diplôme est faite en fonction du nombre de locuteurs de la langue espéranto. Une vingtaine de personnes l'apprennent ou la pratique à Quetigny. Cette remise de diplôme a été suivie par une pièce de théâtre, *Le Testament de Vanda*, interprétée par Sabine Choumiloff.

Créée par Daniel BiroWalker, la section a comme responsable Anne-Marie Laboureau. Les cours ont lieu le jeudi de 20 h 15 à 21 h 45 au centre social et culturel avec un cours débutant et un cours pour les avancés.

INFO Tél. 03.80.71.91.14.

Ce que ne dit pas le journaliste, c'est qu'outre les «officiels» de la photo, participaient une cinquantaine de personnes.

La «cérémonie» fut parfaite, fraternelle et sans emphase ...

Le président du CSC Léo Lagrange, Jean-Michel Pierret rappela ce qu'était l'espéranto, le travail réalisé à Quetigny dans le cadre de Léo Lagrange.

Le représentant du maire, Philippe Schmitt conseiller municipal délégué à l'agenda 21 et élu Vert, après avoir déclaré qu'il avait lui-même commencé l'apprentissage de l'espéranto, salua le mérite de ceux qui vont au bout de l'utopie.

La performance théâtrale de Sabine Choumiloff, très forte et pleine d'émotion, bien qu'en français, illustra l'anti-nationalisme de l'espéranto (histoire dramatique d'une réfugiée des balkans, le texte -d'un haut niveau- dénonce la barbarie, les exactions guerrières là-bas et l'accueil des SDF ici ...)

Enfin, pour terminer la journée, tous se retrouvèrent autour d'un apéro-fromage ...

Le groupe espéranto de Quetigny reste donc actif sur le chemin de la troisième étoile !

**Daniel BIRO-WALKER
Wenceslas DERIVAUX**

■ *Charente Libre* publie dans ses *Tops et flops de la semaine* une brève sur le tribunal d'Angoulême, qui s'est confronté à des problèmes d'interprètes, se concluant par «A quand les audiences en espéranto ?»...

Les FLOPS de la semaine

LE TRIBUNAL D'Angoulême semble avoir un gros problème avec ses interprètes. Il y a peu, c'est une traductrice récusée pour son anglais trop approximatif. Mardi, c'était un problème de russe. L'interprète était cette fois irréprochable. Mais le « client » qu'elle devait traduire, dans une histoire de faux permis, était lui... Arménien un peu démuni face à la langue de Pouchkine. Il devra revenir s'expliquer avec, cette fois, on l'espère, un interprète du pays. A quand les audiences en espéranto ?

■ *Charente libre* publie le 27 octobre un article intitulé :

La guerre racontée en espéranto

Présidente de Charente Espéranto, Marie-France Conde-Rey est en train de traduire en français le journal de Pierre Louis, un prisonnier de guerre espérantiste. Une histoire personnelle et collective.

Qui comprendra les mots «malliberula babilado» ? Les espérantistes qui tomberont sur CL aujourd'hui. Mais aussi les autres qui auront l'occasion de lire la traduction du «Bavardage d'un prisonnier» sur laquelle travaille Marie-France Conde-Rey, présidente de l'association Charente Espéranto.

Un journal pas banal qui raconte la guerre de position, la Débâcle de 1940 et les premiers temps d'une vie de prisonnier en Allemagne... mais en espéranto. Quelque 180 pages écrites entre 1940 et 1942 par Pierre Louis, décédé en 1996. C'est son fils, Jean-Paul Louis, fondateur des Editions du Lérot à Tusson, qui l'a trouvé en vidant la maison, parmi des cartons de livres et de revues espérantistes.

« Enfant, j'ai suivi mes parents de congrès espérantistes en congrès espérantistes, mais je ne parle pas cette langue. Je n'avais jamais entendu parler de ce carnet. Mon père ne parlait pas de cette période de sa vie », avoue Jean-Paul Louis.



Marie-France Conde-Rey vient de s'attaquer à la troisième partie, dans laquelle Pierre Louis raconte la vie dans un camp en Allemagne. (Photo Romain Perrocheau)

« El koncentrejo »

Espérantiste des sections d'extrême-gauche, dans la mouvance internationaliste, Pierre Louis a passé les dernières années de sa vie en Charente, mais est originaire de Nancy, en Lorraine. Tout près de cette frontière qui a explosé sous les coups de l'Allemagne nazie et que ce sous-officier responsable des chevaux a parcourue pour ravitailler les soldats en munitions.

Une carte du calendrier des Postes surlignée permet de suivre son parcours de Maubeuge à la Belgique, pas loin d'Ypres. « La première partie est assez ennuyeuse, avoue Marie-France Conde-Rey qui s'est proposée de traduire l'ouvrage. Les soldats s'ennuient, jouent aux cartes, attendent le ravitaillement. Pierre Louis cherche des espérantistes dans les régions qu'il traverse. A partir de la deuxième partie, ça devient passionnant, c'est la Débâcle, les villages incendiés, l'état-major désorganisé, les soldats et officiers qui partent en ordre dispersé... C'est assez critique. »

L'enseignante à la retraite vient de s'attaquer au dernier

tiers du carnet, la vie dans le camp de prisonniers, « El koncentrejo ». Littéralement « camp de concentration ». Un mot qui, avec le recul, n'a aujourd'hui évidemment pas la même signification que pour Pierre Louis à l'époque.

Une langue née il y a 120 ans

Créé il y a 120 ans par un citoyen juif de Russie, Louis-Lazare Zamenhof, l'espéranto a été fortement combattu par Hitler et Staline pour ce qu'il est : une langue internationale permettant à des gens de différents pays de se comprendre. « Comme les Juifs ou les homosexuels, des espérantistes sont morts dans les camps », rappelle Marie-France Conde-Rey, présidente de Charente Espéranto.

Ils seraient 2 à 8 millions de locuteurs aujourd'hui dans le monde. Qui utilisent 28 lettres de l'alphabet latin, dont quelques-unes avec des accents particuliers. Une langue facile d'accès et évolutive qui se veut un trait d'union entre les peuples. « Plus qu'un moyen de communication, c'est une culture, des valeurs qui rassemblent des hommes et des femmes sur des idées philosophiques et sociales, comme les droits de l'homme, l'écologie, ou le fédéralisme. Elle marche bien dans les milieux alternatifs », dit Marie-France Conde-Rey, également présidente de l'association féministe espérantiste et déléguée du Pen International, sorte d'ONU des écrivains regroupés par langue.

«Un vrai trésor»

Raconté dans une écriture très serrée, penchée, sans aucune rature, ce morceau d'histoire personnelle et collective est ponctué de fleurs séchées collées, de cartes et de dessins, de portraits saisissants de camarades au crayon à papier notamment. « Il échangeait du tabac et de la nourriture contre des portraits », raconte la traductrice.

Une expérience à laquelle Marie-France Conde-Rey, qui travaille pour trois revues espérantistes, littéraire, féministe et d'actualité, est peu habituée. « Les termes militaires comme 23e CR, par exemple, je ne sais pas ce que c'est, surtout que Pierre Louis a écrit sans l'aide d'un dictionnaire. J'ai parfois quelques incertitudes. » N'empêche.

« Ce journal est un vrai trésor. Il y a beaucoup de choses émouvantes et le style est relevé. Pour moi, il mériterait d'être édité. » Jean-Paul Louis, lui, ne voit a priori pas de problème à une éventuelle publication. Comme on dit en espéranto, « Kiu vivos, tiu vidos »... Qui vivra verra.

NDLR: Pierre Louis n'est pas un inconnu du mouvement SAT / SAT-Amikaro, au contraire: il a été l'organisateur d'un congrès de SAT à Nancy en 1954 qui a réuni près d'un demi-millier d'espérantistes, mais surtout, il est connu comme coauteur et illustrateur d'une des plus populaires méthodes d'apprentissage de l'espéranto au premier degré; le Junul-kurso, toujours utilisé, entre- autres dans nos cours par correspondance.



Edonis: S.A.T.-AMIKARO, 67, avenue Gambetta, Paris 20^e

Les mille bouts de la langue

J'ai lu dans la Sago l'article paru dans «Le Monde» (Michel Onfray) et la réponse de François Viangalli sur «Esperanto Info». Je pense que les deux auteurs n'ont pas

complètement exploré le sujet. Voici ma contribution. J'ai songé à l'envoyer au Monde, mais la corbeille de ce journal étant très grande et accueillante...

Chacun voit la réalité avec ses lunettes. Dans le créationnisme, Babel peut avoir plusieurs lectures, y compris la psychanalytique: Dieu craignait que l'humain puisse tout réaliser, y compris devenir Son égal – Quelle arrogance! La peur de perdre son autorité l'envahit. Diviser pour garder le pouvoir! Diviser jusqu'à semer la guerre: les princes qui désirent gouverner comprennent la leçon. Des peuples séparés par des barrières linguistiques; que chacun voit une menace dans l'inconnu et rejette l'étranger les arrange.

Nous pouvons aussi observer les langues avec des lunettes évolutionnistes: des groupes préhistoriques commencèrent à émettre des sons articulés pour communiquer. Des groupes séparés imaginèrent des sons différents pour traduire une même idée. Puis la langue en usage évolue suivant l'humeur et les besoins des ses utilisateurs. Une rivière, une montagne ou autre obstacle barrant la circulation des personnes crée des dialectes avec des nuances variant d'un canton à l'autre. Plus la distance grandit, plus les différences s'accroissent. Un copain m'a raconté qu'il était le seul de sa classe à parler français lors de son entrée à l'école. Les autres parlaient patois, cela vers 1941, à Penne d'Agenais (47) dans

le Sud Ouest de la France. Et cela parce que, si sa mère était de Penne, son père venait d'Auvergne. Leurs patois étant trop différents, ses parents utilisaient le français comme langue commune. Depuis soixante-dix ans, le français s'est imposé partout, seuls quelques très anciens osent encore échanger quelques mots en patois. Mais chaque ancien qui meurt est une bibliothèque qui disparaît. La tradition véhiculait en patois des chants, des contes, toute une culture orale. Avec le patois, celle-ci disparaît car la langue de la domination ne souhaite pas en garder des traces, se conduisant en rouleau compacteur pour assurer son règne, même si, à l'origine, le français n'était que le patois de l'Île-de-France. Mais voilà, les rois parlaient ainsi et s'imposèrent à tout le royaume. Dans l'Occitanie, le bilinguisme resta en usage jusqu'à une époque récente, surtout en campagne et on trouve de vieux actes notariés avec version française et version patoise. L'école a été un facteur d'unification linguistique. Le patois y était interdit. Oui, quelques anciens se souviennent des coups de règle sur les doigts pour un mot de patois lâché dans la cour de l'école.

Un autre moyen d'imposer une culture existe: ridiculiser le local pour adopter

une mode venue d'ailleurs et qui se dit «universelle, internationale». La féodalité des «seigneurs sans visage» dans les coulisses du pouvoir, à l'aide de la monnaie comme levier, tente de robotiser les gens en leur faisant croire à la supériorité d'une culture appauvrie dans une langue «angloïde». L'originalité devient anormale. Tout le monde au pas et les désobéissants chez les fous!

L'espéranto n'appartient pas à un groupe de pouvoir mais à ceux qui l'apprennent. Il se propose d'être un code commun à l'humanité, code fixé par son académie et qui permet à chacun d'exprimer son originalité en se faisant comprendre des autres. Il a été créé dans cet esprit et non pour uniformiser. Comme il n'est pas le reflet d'une culture locale, il a un maximum de souplesse pour traduire chacune d'entre elles, avec toutes ses richesses, pour le plus grand bonheur de tous. En plus, sa pratique ajoute un petit piment mondial aux cultures locales qui se voient respectées et même vivifiées dans leur diversité enrichissante. Alors, si l'expérience vous tente...

Michel MARKO

Qu'est-ce que SAT ? Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail.
www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ? L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT.
www.sat-amikaro.org

Renseignements Pratiques

Permanence au siège

Lundi	17h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00 (non régulière)
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h00 - 18h30
Vendredi	09h30 - 17h00 puis 17h30-19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-Amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Décembre 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde (okaze)	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado: ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Triagrada: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

■ Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:

Claude Gerlat
38 €. (senlaboruloj kaj ĝis 25-jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2011 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,50 €; Svisio: 5 F.S.; aliaj landoj: 4,50 €.

Abono 2011 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio: 32 €; Svisio: 43FS; aliaj landoj: 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

(Ĉekoj al la kasisto: Guy Martin)

IBAN, (por pagi el eksterlando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Glady:

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean:

Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo: Andreo Andrio, Francua' Dekurcelo, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel.: 01 44 24 50 48

TTT-ejo: www.sat-amikaro.org

Reto: sekretario@sat-amikaro.org

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc

38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady: Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean: Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin: 3 rue Voltaire
22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto: lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly
p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen
p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki

Propre

La franclingva adjektivo **propre** havas du ĉefajn sencojn: **propra** kaj **pura**. Pro diversaj figuraj sencoj aliaj tradukoj estas proponataj en kelkaj lokucioj.

■ En unua grupo mi prezentas ekzemplojn, en kiuj tiu vorto signifas «apartenanta ekskluzive al iu aŭ al io»; tiam la traduko plejofte estas **propra**:

Le nom de famille et le prénom sont des noms propres. **La familia nomo kaj la persona nomo estas propraj nomoj.**

Le sens propre ou littéral d'un mot, par opposition à ses sens figurés. **La propra aŭ laŭlitera senco de vorto, kontraste al ties figuraj sencoj.**

Au propre comme au figuré. **Propra-kiel figura-sence.**

Ce trait de caractère lui est propre. C'est un défaut propre à la jeunesse. **Tiu karaktera eco estas propra al li. Tio estas manko propra al la juneco.**

Les capitaux propres d'une entreprise comportent le capital social et les réserves. **La propra havo de entreprenado konsistas el la akcia kapitalo kaj la rezervoj.**

L'ombre propre et l'ombre portée. **La ombroflanko kaj la ombrobildo.**

Vous lui remettez ces papiers en mains propres. **Vi transmetos tiujn paperojn en liajn proprajn manojn.**

Il a écrit cela de sa propre main. **Li skribis tion propramane.**

Rentrer par ses propres moyens. **Rehejmiĝi per siaj propraj rimedoj.**

Il l'a vu de ses propres yeux. **Li vidis ĝin per siaj propraj okuloj.**

Voler de ses propres ailes. **Agi per si mem.**

C'est une question d'amour-propre. **Estas afero pri memestimo.**

Ce sont ses propres mots. **Tio estas liaj vortoj mem.**

Le rire est le propre de l'homme. **La rido estas propraĵo de la homo.**

Distinguer les biens propres de l'épouse et les biens du couple. **Distingi la propran posedaĵon de la edzino kaj la komunan posedaĵon de la paro.**

■ En dua grupo venas ekzemploj, en kiuj **propre** signifas **konvena**, aŭ io simila:

Du bois propre à la construction. **Ligno konvena por konstruado.**

Une atmosphère propre au travail. **Etoso favora por labori.**


Employer le mot propre. **Uzi la ĝustan vorton.**

Une eau propre à la consommation. **Akvo konvena por konsumado.**

Je le crois propre à remplir cet emploi. **Mi kredas lin kapabla por plenumi tiun oficon.**

Ce sont des propres-à-rien. **Ili estas sentaŭguloj.**

A
B
C
D
E
F
G
H
I
J
K
L
M
N
O
P
Q
R
S
T
U
V
W
X
Y
Z



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40% ĝis 5€
 35% ĝis 10€
 25% ĝis 20€
 20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00

Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

■ La tria grupo koncernas okazojn, kiam **propre** signifas, ke io prezentas klaran aspekton, ke ĝi estas **neta**:

Cette copie est propre. **Tiu kopio estas neta.**

Mettre au propre un brouillon. **Netigi malneton.**

Voilà un travail propre. **Jen diligenta laboro.**

■ Kiam **propre** signifas «ne makulita nek kovrita de nedezirataj substancoj», ĝi tradukiĝas per **pura** aŭ ties kunmetaĵo, escepte en iuj figuraj lokucioj:

Ces draps sont bien propres. **Tiuj littukoj estas tre puraj.**

Avoir les mains propres. **Havi purajn manojn.**

Manger avec ses doigts, ce n'est pas propre. **Manĝi per siaj fingroj, tio ne decas.**

Propre comme un sou neuf. **Pura kiel freŝa monero.**

Nous voilà propres! **Jen ni en koto!**

Les chats sont propres. **La katoj estas puremaj.**

Cet enfant était propre à deux ans. **Tiu infano iĝis puruma, kiam ĝi dujariĝis.**

Il ira à l'école quand il sera propre. **Li vizitados la lernejon, kiam li estos puruma.**

Cette affaire n'est pas très propre. **Tiu afero ne estas honesta.**

C'est du propre! **Kia maldecaĵo!**

■ Lasta uzo de **propre** indikas, ke io ne aŭ ne multe poluas, t.e. ne aŭ ne multe malpurigas la medion:

Une voiture propre. **Mediindulga veturilo.**

Ces vieilles usines ne sont pas propres. **Tiuj malnovaj fabrikoj ne indulgas la medion.**


Andreo Andrio

Panjo donis al mi tiun freŝan moneron. Ĝi estas pura, pura kiel freŝa monero, evidente.

Testcele, mi faligas ĝin en koton. Jen ĝi en koto!

Kote makulita, ĝi ne plu povas esti modelo pri pureco, ĉu ne? Ĝi do perdis sian freŝecon.


Aĥ! Tamen, en ĉi afero, mi perdis mian moneron. Jen ankaŭ mi en koto!



Recenzo

Sonĝoj de kristalo

Jerome Leroy
 Trad.
 LeQuint-Le Puil
 Eld. SAT-EFK
 Ĉe la libroservo 5€



Jen libreto, kiu sukcesas kun majstra koncizeco kaj pere de atentokapta rakonto cerbumigi pri proksima estonteco. Kvankam scienc-fikcia, ĝi ŝajnas terure kredebla - escepte de la cervinoj kun fosforeskaj feloj. Glaciĝinta norda Francio post malapero de la Golfo-fluo, do ripeto de tio, kio verŝajne okazis, je pli modesta skalo, antaŭ kelkaj jarcentoj. Degenero de la okcidenta civilizo, post fin-seniindustriigo, kaj konsekvence fintransiro de la gravitocentro de la mondo al Brazilo, Hindio kaj Ĉinio, kiu post proleta revolucio starigis liberecan-komunisman socion - tamen ne je monda skalo. Iel strange, el la eksaj potencoj, elsaviĝis Japanio. Ĉu ĉar la aŭtoro, ŝajne tamen bona konanto de la japana kulturo, preteratentis la ŝovinismon de granda parto el la reganta japana klaso? De ĝi oni logike povus atendi, ke ankaŭ ili pagus, kiel okcidentanoj, pro sia antaŭa aroganteco. Pri tio estos interesa la vidpunkto de japanaj kamaradoj.

Pli ol tiu detalo indas komenton ĝuste tiu paradoksa situacio, ke dum en Ĉinio ŝajne regas liberecana komunismo, barbareco plu plagas grandan parton el la mondo, kaj rasismo regas ĉie. La rifuĝintoj el Eŭropo ja pagas por la krimoj de siaj prauloj. Iel, tio pensigas pri «La ruĝa stelo» de Bogdanov, alia scienc-fikcia romano, kiun la eldonkooperativo de SAT eldonis en 1929. Ja ankaŭ tie aperas la

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.



Stilekzercoj Raymond Queneau (Rajmondo Keno), tradukis el la franca István Ertl

eldonis La KancerKliniko (1986, 2006), formato A5, 40 paĝoj, 5 € ĉe la libroservo.

Kiam mi ricevis la tradukon de Ertl, antaŭ 25 jaroj, mi apenaŭ povis kredi ke junulo, plie hungaro, tiom majstris kaj Esperanton kaj la francan! En tiu epoko, preskaŭ neniu konis tiun junulon, kiu poste donos al ni la romanon Tiu toksana septembro (kun Corrado Tavanti), tradukon de Jules Verne Esplorvojaĝo, la romanon La Postdomo, la poemaron Provizore, tradukon de Imre Kertész Sensorteco, ktp.

Rajmondo Keno estas franca verkisto (1903-1976). Li faris el

sia romaneska verkaro sisteman eksperimenton, samtempe humoran kaj melankolian, de la eblecoj de lingvo parolata aŭ skribita.

Pri Stilekzercoj: la rakontanto renkontas, en aŭtobuso, junulon je granda kolo, kun ĉapelo ornamita per plektaĵo anstataŭ rubando. La junulo interŝanĝas kelkajn vortojn iom akrajn kun iu vojaĝanto, kaj poste sidiĝas sur ĵus liberigita seĝo. Iom poste la rakontanto renkontas la saman junulon, kiu havas vigan konversacion kun amiko. Tiu lasta

konsilas al li metigi pli alten la plej supran butonon de sia surtuto.

Tiu kurta historio estas rakontita naŭdek naŭ fojojn, laŭ naŭdek naŭ diversaj manieroj. La esperantista publiko povis ĝui kabaredajn versiojn far SEK (Studenta Esperanto-Klubo de Zagrebo) kaj far Henri de Sabates.

Stilekzercoj estas unu el la plej popularaj libroj de Rajmondo keno.

Ĵak Le Puil



Jen unue, La bazo

Sur la linio "S", en vigla trafikhoru. Ulo pli-malpli dudeksesjara, mola ĉapelo kun galono anstataŭ rubando, kolego kvazaŭ oni tiris ĝin. Multaj elbusiĝas. La pritraktata ulo ekindignas kontraŭ najbaro. Lia riproĉo: li ĉiufoje ekpuŝas lin, kiam iu preterpaŝas. Plendaĉa tono laŭintence malica. Ekvidante liberan sidlokon, li tuj ekposedas ĝin.

Du horojn poste mi renkontas lin sur la Placo de Romo, antaŭ la stacidomo Sankta Lazaro. Akompanas lin amiko, kiu parolas al li jene:

- Vi devus metigi aldonan butonon sur vian surtuton.

Li montras al li kien (sur la klapon) kaj kial.

Due, la Sam-sona:

Somere, sur "S", sesfoje sepduonjara spontaneulo, supre strangan surkapajon surportanta, subite, senhonte surprizas sinjoron, skandale skoldas sian sambusanon, supozigante siaparte sinsekvajn, sovaĝajn, surpiedajn suferigojn; sentante sian sensukceson, senespere surĵetas sin sur senpasaĝeran sidlokon.

Su sorojn soste, santaŭ sa stacidomo Sankta Sazaro, si simarkis sin siskutantan sri sutonoj sur sia surtuto.

Kaj trie, la maniero Bombasta:

En la horo, kiam komenciĝas fendiĝi la rozaj fingroj de la aŭroro, mi ascendis, kiel ĵetita lanco, en solidstaturan, bovinokulan aŭtobuson de la kurbe serpentanta linio "S". Kun la precizeco kaj akreco de Indiano sur la pado de la militiro, mi rimarkis la ĉeeston de junulo, kies kolo estis pli longa ol tiu de la rapidpieda ĝirafa, kaj kies molan feltan ĉapelon ornamis plektaĵo, simila al tiu de stilekzerca heroo. La funebra, fulgobrusta Malkonkordo, per sia buŝo, infektita de dentopastneuzo, la Malkonkordo, do, ekblovigis sian malignan viruson inter ĉi junulo kun ĝirafa kolo kaj plektaĵo ĉirkaŭ la ĉapelo kaj pasaĝero kun faruneca kaj sendecida mieno. Ĉi supra adreŝis al la alia jenan parolon:

- Diru al mi, malbona homo, ŝajnas, ke vi konscie suferigas miajn piedojn?

Eldirinte tiujn vortojn, la junulo kun ĝirafa kolo kaj plektaĵo ĉirkaŭ la ĉapelo rapide sidiĝis foriris.

Pli malfrue, sur la Placo de Romo de dignoplenaj proporcioj, mi refoje rimarkis la junulon kun longa kolo kaj plektaĵo ĉirkaŭ la ĉapelo, kiu estis akompanata de kamarado, fakulo pri eleganteco, kiu prononcis jenan kritikon, aŭdeblan por miaj viglaj oreloj, kiun li adreŝis al la plej ekstera vestoparto de la junulo kun ĝirafa kolo kaj plektaĵo ĉirkaŭ la ĉapelo:

- Vi devus mallarĝigi ties dekolton per la surmeto aŭ suprenigo de butono de cirkla periferio.

problemo pri sinteno de «socialisma» lando - aŭ eĉ planedo, en la ruĝa stelo, fronte al la cetera mondo, kiun ĝi emas imperiisme koloniigi.

Fine, ni venu al la herooj de la rakonto. Iom paradokse, por aŭtoro kiu tre videble simpatias al socialismo, ili estas membroj de la «hiperklaso» - t.e. speco de tutmonda kosmopolita elito, kiu studas en diversaj kontinentoj kaj vagadas esplorocelo, aŭ profitocele, en la eŭropa sovaĝejo. Reciproke, fiuloj estas ĉe la alia flanko. En la ĥaosaj regionoj, iuj klopodas elturniĝi per individuaj solvoj. La rakonto mem, kiu komenciĝas iom trankvile, iĝas pli kaj pli atentokapta en la lasta triono de la teksto, ĝis la fina kulmino. Ĝi trafefe memorigas, ke kunekzistado de tute malsamaj mondoj ne okazas tute glate.

Pri la traduko mem, nenio direnda. Ĝi estas tiel flua, ke oni simple forgesas, ke ne temas pri originala verko.

Vinko Markovo

Legindaj Legendoj

La kastelo de Vizilo.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

En 1788, reĝa edikto nuligis la prerogativojn de la regionaj asembleoj. La grenobloj ribelis, ĵetis de la tegmentoj tegolojn sur la reĝajn soldatojn. Tiun tagon oni nomis la «tegotago».

La deputitoj ne povante kuniĝi en la Grenobla Parlamento, kuniĝis en la polmoludejo¹ de la kastelo en Vizilo.

Tiu kastelo estis konstruita de Francisko de Bonne, Duko de Lesdigiero.

Francisko de Bonne naskiĝis en Daŭfenio² en 1543. Li renkontis en Parizo la junan Henrikon de Navaro. Li iĝis soldato de la barono Gordes, ĝenerala leŭtenanto de Daŭfenio kaj de la reĝo.

Kiam la protestantoj ribelis, li luktis en ilia kampo sub la aŭtoritato de sia kuzo Antonio Rambo. Li poste iĝis la estro de la protestantoj en la regiono Ŝampsor³, multe batalis, kaj pli malfrue lian aŭtoritaton agnoskis ĉiuj daŭfeniaj protestantoj, kiam Henriko de Navaro iĝis reĝo de Francio.

Post pluraj nesukcesoj, li venkis la katolikan urbon Grenoblo, administris ĝin kaj plenumigis grandajn vorkojn.

Interkonsente kun la guberniestro⁴ de Daŭfenio Alfonso d'Ornano, li defendis Daŭfenion kontraŭ la duko de Savojo.

Pro sia fidelo al la reĝo, li fariĝis guberniestro de Grenoblo (1591), akiris la titolon Duko de Lesdigiero kaj Marŝalo de Francio en 1609. Jen li Konestablo⁵ de Francio, bona administristo. Li aĉetis bienon en la vilaĝo Vizilo en 1593, kie li konstruigis kastelon kun vasta parko. Ĉio tio estas vera. Kontrolu.

Tiu parko prezentis terkulturan, industrian kaj ankaŭ strategian intereson ĉar ĝi situas je la elirejo de mallarĝa valo, itinero al Italio.

Lesdigiero do, volis konstruigi altan ĉirkaŭan muron, samtempe apartigilon kaj defendilon. Sed kia laboro! Kiom da tempo estos necesa! Tiam, la Diabolo intervenis. Li proponis al la konestablo rajdi sur la ĉirkaŭa limo de la bieno, kaj li, diablo malantaŭe konstruos la muron sed «atentu, fine de la konstruo, mi certe kaptos vin kaj prenos vian animon». Lesdigiero spertinte multajn batalojn ne timis. Li galopigis sian ĉevalon, hop! hop! La rajdanto rapidis, kaj ankaŭ la konstruanto. Fine de la tuta ĉirkaŭajrado, la ĉevalo troviĝis fronte al la komenca parto de la muro. Ĝi flanken eskapis, saviĝis. La diablo tiel rapide laboris, ke la vosto de la besto restis kaptita inter la du ekstretoj de la muro. Oni ankoraŭ povas vidi ĝin.

Tio estas vera. Kontrolu!

Klod

Notoj:

1	polmoludejo	loko, kie oni ludas polmoludon, <i>salle du jeu de paume</i>
2	Daŭfenio	lando de la reĝaj princoj, kies ĉefurbo estas Grenoblo.
3	Ŝampsor	regiono apud la urbo Gap
4	guberniestro	<i>gouverneur</i>
5	konestablo	ĉefkomandanto de la reĝa armeo <i>connétable</i>



Wikipedia, Milki



Esperantistoj aktivas

San-Nazero (44) konkurso

Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn al tiu konkurso.

Konkursaj reguloj

Jara temo: Vojaĝantaj Popoloj

Formato: min. 40 cm x 30 cm

Kategorioj

A: ĝis 7 jara

B: pli ol 7 ĝis 10 jara

C: pli ol 10 ĝis 14 jara

Manso (72 Le Mans)

La 16-17an de oktobro okazis en Manso (72) la 25a «Horo de la libro». Dum tiu salono estas spaco por la asocioj, kaj ĉeestis kiel ĉiujn jarojn esperantistoj de la GEM (Grupo Esperanto de Majno). Tio estis agrabla okazo por utilaj informoj pri Esperanto kaj multaj interesaj kontaktoj kaj interŝanĝoj.

Sur la ekrano vidiĝas diapozitivoj kiu, per salutoj de esperantistoj el multaj landoj, invitas al koncerto de FaMo kaj JoMo, la 12an de novembro.

Françoise Guihaumé

Nilvango (57 Nilvange)

Lernu kaj praktiku Esperanton en Nilvange (Francio)

apud Luksemburgio
de la 4a ĝis la 8a de aprilo 2011

Programo

Kurso por komencantoj: Antonio Quijada el Hispanio

Kurso por progresantoj: Bernard Vivier

Kurso pri gramatiko: André Cherpillod,

Ekskursoj postagmeze en la regiono kaj Luksemburgio...

Kulturvesperoj: prelego pri lingvoj de André Cherpillod, filmoj en Esperanto.

Reklamo en La Sago ?!

Ja reklamado estas ilo de konsum-socio, kiu ne tre kongruas kun la ideologio de SAT-Amikaro, sed ĉi foje, temas pri varo ne tro kontestata de la verda mondo... Tamen mi bedaŭras la misuzadon de «jogurto», kiu PIVE estas «lakto kazeigita k acidigita per speciala fermento». Ja reklamo estas reklamo, kaj eĉ en Esperanto, ĝi ne hezitas mensogi por vendi !

Sergo

Laŭklaĉe, SEITA, aliĝas la ideon, kaj preparas cigaredojn kun Eo-teksto «Tabako murdas» (plua komerc-mensogo, ĉar fakte ili estos el laktuko). Ni evidente publikigos tiun interesan ontan krim-romanon epizodon...

de infan-desegnaĵoj

Limdato: la 10an de Marto 2011

Dorse de la desegnaĵo notu, *esperantlingve*, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la desegnaĵo.

Premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio.

Bonvolu sendi desegnaĵojn al:

Centre Culturel St Nazaire Espéranto
38 rue de la Croix Fraîche
44600 SAINT NAZAIRE, FRANCE



La restadejo staras en agrabla parko: tri manĝoj kaj unu nokto 36,00 €, aliĝotizo = 60,00 €
Organizas Esperanto-Thionville kaj Franca Fervojista Esperanto Asocio

Informoj kaj Aliĝo:

Espéranto-Thionville
Bernard VIVIER
25 boulevard du Jura
Saint-Nicolas-en-Forêt
FR - 57700 HAYANGE Francio
Tel : +33 (0)3 82 58 92 88

@: esperanto-thionville@laposte.net

Retejo: <http://esperanto-thionville.ass0.fr/>

Informas Bruno HENRY
Espéranto-Thionville



JP Fernon



Sojasun jogurtoj en Esperanto

Rennes - Francio - 4a de Novembro 2010 - Informas *LinguaForce*⁽¹⁾

La profesia ekspoziciego *SIAL* okazis apud Parizo inter 17a kaj la 21a de oktobro 2010. Inter ties pli ol kvinmil budoj, unu el la grandaj estis tiu de *Triballat*. Sur tiu ĉi, kune kun diversaj produktoj kaj novaĵoj, videblis pakajo de la jogurtoj Sojasun tute en Esperanto! Ĝi estis prototipo tie prezentata estante kandidato por novigpremio. Esperantigis ĝin la kompanio *LinguaForce* en Rennes.

En artikolo de la septembra numero (28) de la profesia revuo *CFIA*, *Olivier Clanchin*, estro de *Triballat*, klarigas sian intereson por Esperanto.

Eŭropiĝi por entrepreno... "labori kun Esperanto"⁽²⁾

(...) Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri "eŭropa kulturo" ankaŭ temas pri "komunikado"... "Ni ekopiniis ke Esperanto povus esti modelo". Kiam, aŭdinte tion, oni ironias pri Esperanto, la estro ekridetas: "Nu, ankaŭ ĉikaze, same kiel por 'Bio' kaj sojo, ekzistas homoj kiuj deziras kredi en ĝi. Ni kredis en la aliaj projektoj... do Esperanto, kial ne? Tio indas, do oni provu. Estas pozitive preti sukcesigi defiojn!" La entrepreno estas bona vektoro por testi tiun koncepton. Ekde kiam estas io kolektiva kun homoj kiuj ne uzas saman lingvon, Esperanto povas esti kohera ilo, kiu regatas dekfoje pli rapide ol la angla. "Ni ne forgesu ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni ĉiuj havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn demarŝojn. Krome, en la logiko de daŭripovo, tie kie oni parolas pri malpligrandigo de pakajoj, kiel fari per tiom da lingvoj kiom da landoj kiam oni volas eksporti unusolan produkton? Kiam vi aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero estas, da manlibroj, en ĉiuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi. (...)

⁽¹⁾<http://www.linguaforce.com/wawawoo/esperanto/sial2010.html>

⁽²⁾Titolo en Esperanto en la franclingva fonta teksto, kiu legeblas tie: <http://www.cfiaexpo.com/infos-marche/triballat.html>



LA OBJEKTOJ ESTAS TIAJ,
KIAJ VI KREDAS ILIN. IUI
VOJAS SUR LA MARO
TIAL, KE POR ILI NE ESTAS
MARO...

JOAN BODON

Naŭcelo (12 Naucelle) NOVA Z.E.O. EN FRANCIO

la urbeto, ĉiu reprezentanto de lingvo estis akompanata de infano portanta la flagon de la koncerna lingvo. Do Esperanto-flago flirtis en la stratoj de Naŭcelo.

Mi provis ekscii kiel estis elektitaj la lingvoj, kaj aparte Esperanto. Nu tiu okcitana verkisto, kiu subskribis **Joan Bodon** (prononcata Ĉuon' Budu', ĉar ankaŭ la okcitana ne estas fonetika lingvo), tre interesiĝis pri la diversaj kulturoj de la mondo kaj pri la lingvoj, kiuj ebligas studi

La 23an de Oktobro 2010, en Naŭcelo, departemento Avejronio, estis inaŭgurita nova «Zamenhof-Esperanto-Objekto». Sur placo laŭ la nomo de loka verkisto, Johano Budu' (*Jean Boudou*, 1920-1975), estas instalitaj 25 kvadrataj slaboj el griza sabloŝtono, kun 1,2 metraj lateroj. Sur tiuj slaboj estas gravurita elektita frazo de la aŭtoro en 24 lingvoj, interalie en Esperanto; sur la 25a slabo estas la listo de la lingvoj.

Partoprenis la inaŭguron lokaj kaj departementaj instancoj (urbestrino, deputitino, senatanino, ktp), kaj reprezentantoj de la lingvoj gravuritaj, por legi la frazon en sia lingvo. Tial mi estis invitita por legi la frazon en Esperanto. Por tiu manifestacio la municipo akiris flagojn por reprezenti ĉiujn lingvojn; dum la festa procesio tra



ilin. Interalie li interesiĝis pri Esperanto, tial lia familio deziris, ke tiu lingvo estu reprezentita sur la monumento. La ceteraj lingvoj estis elektitaj por reprezenti plurajn kategoriojn: la antikvaj (hebrea, helena kaj latina), la plej disvastigitaj (angla, ĉina, ktp) kaj la minoritaj (eŭska, keĉua, ktp). Jen la kompleta listo de la 24 lingvoj: hebrea, keĉua (la lingvo de la Inkaoj), alzaca, sangoa (oficiala lingvo en Centrafriko), japana, kataluna, tamaziĥta, bretona, araba, portugala, itala, Esperanto, okcitana, franca, hispana, germana, ĉina, korsika, rusa, eŭska, hindia, helena, angla kaj latina. Rimarku, ke Esperanto, kiel la franca lingvo, kuŝas en honora loko, tuj apud la originala lingvo, la okcitana.

Andreo Andrio

